





Giganta moao, iama novzelanda birdo.



Esperanto sub la Suda Kruco

Septembro-Oktobro 2003
Numero 65 (vol. 11, no.5)



Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Numero 65 (volumo 11, numero 5), Septembro-Oktobro 2003

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio

☎: (08) 9641 1937

Faksoj: (08) 9641 1134

E-poŝto: sudakruco@sudakruco.org

Libroservo

Libroservo de AEA, Esperanto-Domo, 143 Lawson St, Redfern, NSW 2016, Aŭstralio. E-poŝto: libroservo@ans.com.au

Korespondaj kursoj

Hazel Green, 44 Towoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. E-poŝto: hazgreen@twomba.net

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de Esperanto sub la Suda Kruco: “Ni vere bezonas artikolon pri ...?” Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Ni preferas ke vi sendu vian kontribuon per e-poŝto, al la adreso: sudakruco@sudakruco.org; vi povas ankaŭ sendi ĝin sur Zip-disko (100mb aŭ 250mb), sur komputila disko (Mac aŭ Windows), sur KD, aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezzone teksto povas esti mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Pasko kun bilbioj (Hazel Greene).....	3
Edziniĝo de Penny Vos — fotoj.....	4
Recenzo: <i>Kompendio de Psikanalizo</i> (Ⓒ).....	5
Aventuroj en Belgujo (Jonathan Moylan).....	5
Kongreso de AEA+NZEA.....	6
Bona pano, bona viando, bona Dio, ni manĝu! (June Perkins).....	7
Radio 3ZZZ.....	8
La eskapinta esperantisto (Rosalie Schultz).....	9
New Zealand Book Purchasers.....	10
For the Beginner.....	11
Nekrologo pri Harry Peddie (Betty Cleminson).....	15
En la e-librejo.....	16
Netradukeblaj esprimoj (Donald Rovers).....	17
Interrete.....	18
Esperanto en Tianjin-a Fremdlingva Universitato (Han Zuwu).....	19
La 51a Kansai Esperanta Kongreso (Dianne Lukes).....	20
SARS kaj la UK 2004.....	22
Marta kaj Gastono (Gaye Phillips).....	23
Vere, la ŝtonoj parolas (Henriko Broadbent).....	25
Laŭ mia vidpunkto (Marcel Leereveld, Donald Broadribb).....	26
Odlo Bokserp.....	30

Pasko kun bilbioj

de Hazel Greene

[Bilbio = macrotis, marsupialo proksimume granda kiel kuniklo.]

Ĉirkaŭ pasko multaj aŭstralianoj ferias dum kvar tagoj kaj ĝuas viziton al la marbordo, al amikoj, aŭ al bela tendumejo. Mi mem kutime pasigas la paskan semajnon en muzika festivalo kun ĥoro, kelkaj esperantistoj ofte ĉeestas la nacian festivalon pri popolarto, kaj esperanta paro eĉ uzis la ĉijaran longan semajn non por geedziĝi. Kial, do, mi estis kontenta ĉijare veturi 800 kilometrojn dum Pasko por tendumi tri noktojn en ruĝa polvo?



Etaj ĉarmaj marsupialoj, bilbioj, logis nin al Nacia Parko Currawinya en sudokcidenta Kvinlando. Antaŭ 150 jaroj, bilbioj okupis 70% de la aŭstralia kontinento, sed post la enkonduko de eŭropaj bestoj, precipe kunikloj, bilbioj preskaŭ malaperis. Maloftajn spurojn oni trovis nur en dezertaj regionoj. Kunikloj, bovoj kaj ŝafoj detruis la taŭgan medion. Sovagaĵ katoj kaj

vulpoj formanĝis bilbiojn. Sen protekto, ĉi tiuj mildaj marsupialoj apenaŭ povis ekzisti.



Pro la instigo de la tiel nomataj “bilbiaj fratoj”, Peter McRae kaj Frank Manthey, oni komencis konstrui en 2000 la Komunuman Porbilbian Barilon de Currawinya.

Vere, barilegon longan je 20 kilometroj. Kaj ĝi ja estis komunuma: post edukado kaj persvado faritaj de Frank, multaj ordinaraj aŭstralianoj kaj alilandanoj donis monon por aĉeti erojn de la barilo. Per la organizo Volontuloj por Mediprotektado en Aŭstralio (Australian Conservation Volunteers), gejunuloj el diversaj landoj venis por starigi la amason da drato, retaĵo, kaj stangoj.



Malgraŭ varmeĝo, polvo kaj muŝoj, volontuloj el landoj kiaj Germanujo kaj Japanujo ĝojis dum ili lacigis siajn muskolojn por protekti la minacatajn marsupialojn.

Festivalo dum Pasko 2001 festis la fakton, ke la tuta barilo jam staris. Dum la sekvaj du jaroj oni forigis ĉiun katon, vulpon, eĉ kanguruon el la porbilbiaj 25 kvadrataj kilometroj da tero. Kaptitaj bilbioj feliĉe kaj fekunde naskis, ĝis estis 40 pretaj por nova hejmo.

Por la malliberigo de bilbioj en ilian sekuran areon, oni aranĝis alian feston en Pasko ĉijare. Kun centoj da homoj kaj milionoj da muŝoj ni iris al la forforeja, seka, sovaĝa nacia parko Currawinya. Tage ni promenis sur ruĝa tero sub vasta bluega ĉielo al belaj lokaj, aŭ pasigis tempon en kaj ĉirkaŭ malnova ŝaftondejo kie ni legis kaj aŭdis rakontojn kaj informojn pri bilbioj, pri aliaj bestoj, lokaj vegetaĵoj, historio, kaj la konstruo de la barilo. Nokte, sub malbrila ruĝa lumo en kaĝego, ni rigardis bilbiojn, kiuj dormas en la tago, dum ili petolas kaj fosas en sablo.

Kaj ĉu la etaj marsupialoj ĝuas sian novan hejmon en la koro de tereno kie antaŭe bilbioj loĝis dum jarmiloj? Nu, ankoraŭ ne. Ni ja estas en Aŭstralio, kaj ĉio dependas de pluvo. Por rekresko de naturaj herboj kaj insektoj post protektado, la enbarila tereno bezonas iom da pluvo, sed bedaŭrinde la sezono tie restas seka. La bestetoj atendas pacience kun siaj "gepatroj" Peter kaj Frank.


Ĉar ili kaptis la korojn de homoj, bilbioj verŝajne ĝuos estontecon, unue malantaŭ barilo, poste pli vaste. Eblas esperi, ke ili estos ambasadoroj por

aliaj minacataj kreaĵoj, kaj ni haltigos senpensan detruon.

Pli da informo, bedaŭrinde nun nur en la angla, pri bilbioj kaj ilia savado oni trovas ĉe:

www.easterbilby.com.au


NACIA PARKO CURRAWINYA



Edziniĝo de Penny Vos: (nun Penny Pym)



(→ p. 6)



Sigmund Freud: *Kompendio de psikanalizo*. Tradukita de Gérard Patureaux. Prago: Kava-Pech, 2003. 109p. Bindita.

Grandparte anglalingvaj psikanalizistoj emas ignori ĉi tiun verkon, ĉar ĝi ŝajnas kontraŭi plurajn liajn pli fruajn ideojn, kiujn la anglalingva psikanalizo kvazaŭdogmigis. Nu, Freud neniam hezitis ĝisdatigi kaj korektis siajn antaŭajn opiniojn, kiam lin konvinkis pli novaj trovoj. Inter la 1880-oj kaj 1939 pasis multe da tempo, kaj liaj konkudoj psikanalizaj multe maturiĝis. Precipe interesas ke je la morto de Freud en 1939, la vidpunktoj de Sigmund Freud kaj de Carl Jung (kiu ĉ.1915 fondis propran psikanalizan skolon) jam estis interproksimiĝintaj multe pli ol ili ambaŭ konsciis. Eble

tial iliaj fruaj adeptoj malemis akcepti iliajn maturajn vidpunktojn/teoriojn, kaj tiel nuligi la jardekojn longan vort batalon inter tiuj du pioniroj de ĝenerala psikanalizo.

Fizike, la libro estas bonaspekta, fortike bindita, havinda sur la librobreto. Komposteraroj, plejparte tre malgravaj, ĝenas la atentan leganton, sed neniam la komprenon.

Provlegis kaj korektis la tekston de la traduko, antaŭ ĝia eldoniĝo, du bone konataj profesiaj psikologoj esperantistaj: Donald Broadribb kaj Claude Piron, kies familiareco kun la pensoj kaj sinesprimado de Freud certigis la ĝustecon de la transmeto de liaj konceptoj en Esperanton.

Resume, bonvena aldono al la fakliteraturo en Esperanto. □

Aventuroj en Belgujo

de Jonathan Moylan

Mi estis en Belgujo dum Julio kaj mi vizitis esperantistojn en Antverpeno (la urbo kie ni loĝis kiam ni estis tie). Mi vizitis la Esperanto-centron de FEL (Flandra Esperanto-Ligo), la grupo kiu eldonas *Monaton*, kaj la plej granda Esperanto-grupo en Belgujo. Mi vespermanĝis kun kvin esperantistoj (inkluzive de “Stella” kiu sendas salutojn al Franciska). Mi parolis dum horo kaj duono pri Aŭstralio (tute bonaj reklamoj, escepte de nia soci-

politika sistemo, kiun mi iom kondamnis!).

Esperantistaj komencantoj de Bruselo venis por aŭdi min ĉar ili venos al Aŭstralio post 3 monatoj.

Mi povis konsulti mian retpoŝton dum la vojaĝo, kaj unu tagon mi trovis retmesaĝon de Bob Felby, kiu skribis: “Se vi hazarde trafas la buson No. 1 en Antverpeno, la ŝoforo estas esperantisto!”. Ŝajnas, ke Andries Lamers estas plumamiko de Bob Felby, kiun Bob

neniam renkontis; sed mi invitis lin kaj parolis kun li en Antverpeno!

Antverpeno estas proksimume same granda kiel Novkastelo, sed kvankam ni havas 9 membrojn, ili havas 140 membrojn! Ili donis al mi historion (en tri 25-jaraj sekcioj) de la

Antverpena Esperanto-Grupo ekde ĝia kreiĝo en 1907. Nu, la mondo estas malgranda, ĉar ŝajnas ke mia pra-pra-onklo (la onklo de mia avo) estis membro de la grupo de 1921, ĝis (probable) sia morto en 1952, kaj li ankaŭ estis ĝia sekretario! □

Kongreso de AEA/ NEA, Januaro 2004

Datoj: alveno je lundo la 19a, foriro je dimanĉo la 25a.

Kongresejo: Uniting Church Conference Centre, Margate Beach, Redcliffe
www.uconferencecentres.ucaqld.com.au

Loĝejo: Aŭ en dulit-ĉambro aŭ en dormejo

Kosto: Dulit-ĉambro, \$335; dormejo, \$305; por pensiuloj, \$295

La tarifo inkludas ĉiujn manĝojn kaj tepaŭzojn.

Kelkaj demandoj alvenis al mi pri la venonta kongreso. Ŝajnas esti iom da konfuzo pri kio okazos. Ĝi estos kongreso, ne somerkursaro, do ne estos lecionoj aŭ ekzamenoj. Tamen, se vi dezirus fari la parolan parton de ekzameno, tiu eblos. La LKK deziras (fakte petegas) ke ĉeestantoj kontribuu al la programo. Kompreneble, la Jara Ĝenerala Kunveno de AEA okazos; ankaŭ, ni ekskursos en la regiono. Kaj, mi petas, preparu erojn por la kutimaj konkursoj pri dramo kaj kanto. Sed la cetero de la programo atendas vian kontribuon.

Ĉu iuj demandoj? Demandu aŭ al Kay Andersen, sekretario, LKK,

kjand@ozemail.com.au (07 3848 4428), aŭ June,

ronjuneperkins@powerup.com. □

← de Paĝo 4: Edziniĝfestoj de Penny Pym



Malantaŭe: Kam Lee, Miranda Lutz, Ben, Tudor Holton, Allan Bishop. Antaŭe: Jenny Bishop, Penny, Brad.

Bona pano, bona viando, bona Dio, ni manĝu

de June Perkins

“Rapidu ĉiuj! Ni devas foriri *nun!*”

La tri infanoj lante respondis al la krio de la patrino. Tamen, baldaŭ panjo kaj la tri infanoj veturas en la familia aŭto survoje al lernejo kaj laborejo.

“Ĉu vi havas vian projekton, Geoffrey? Vi scias ke hodiaŭ estas la limtempo por prezenti ĝin?”

“Jes panjo, mi havas ĝin en mia dorsosako.”

“Panjo, mi bezonas monon por lerneja ekskurso. Mi devos pagi kvin dolarojn al la instruisto, hodiaŭ,” diris Ross, la plej maljuna filo.

Al la plej maljuna, la patrino diris: “Dianna, mi petas, prenu la monon por Ross el mia monsaketo. Ĉu vi memoras ke mi devos ĉeesti kunvenon post la fino de la lecionoj, hodiaŭ? Ĉu vi povos komenci la ĉefmanĝon antaŭ ol mi alvenos hejme?”

Dianna: “Jes Panjo. Mi jam pensis pri tio. Lastatempe, ĉe mia kuirklaso, mi lernis kuiru stufaĵon. Mi tre ŝatas fari ĝin. Mi rimarkis ke estas sufiĉe da bovoviando en la fridujo kiu estus taŭga por fari stufaĵon. Kion vi pensas pri tio?”

Panjo: “Bonege. Tio estos granda helpo al mi. Dankon. Mi revenos hejme, kiel plej eble rapide, post la kunsido.

“Mi preparis lunĉon por vi ĉiuj. Estas en la fridujo. Havu ĝin kiam vi revenos. Ankaŭ, ne forlasu la korton. Vi rajtas spekti la televidon. Geoffrey kaj Ross, mi petas, konduku bone.”

Post la fino de la lecionoj, la infanoj revenis hejmen per aŭtobuso. Ili tuj traserĉis la fridujon por sia lunĉo. La plej juna knabo rapidis al la televida ĉambro, kaj baldaŭ li estis ĝuanta la programojn por infanoj.

Dianna memfide komencis la preparadon de la stufaĵo laŭ la recepto. Geoffrey malaperis, kiel dek-tri-jaraj knaboj ŝatas fari. Ĉio estis paca dum la sekva duonhoru. Subite, Geoffrey alvokis ekscite, “Dianna, venu rapide. Mi ĵus mortigis serpenton!”

Dianna aperis ĉe la malantaŭa por-do. “Forlasu ĝin, Geoffrey. Vi scias ke Panjo diris ke vi tute ne alproksimiĝu al serpentoj. Se vi ne lasos ĝin sola, mi diros al Panjo kiam ŝi revenos hejme.”

Pro tia minaco, Geoffrey malvolonte lasis la serpenton en la ĝardeno kaj eniris la domon. “Ho, bone, ne gravas. Ne necesas diri al Panjo.”

Geoffrey ne estis kvietita dumlonge. Scivole, li diris al Dianna, “Kion vi faras?”

“Mi kuiradas stufaĵon por la ĉefmanĝo. Mi lernis la metodon ĉe la lernejo.”

“Bonodoras.” Geoffrey pensis plue, “Vi devos uzi iom de la viando el la serpento en ĝi. Mi manĝis ĝin unufoje kiam miaj amikoj kuiris ĝin ĉe la skolta kampo. Ĝi estis bongusta.”

“Tute ne! Mi ne intencas enmeti tiun aĉan viandon en mian stufaĵon. Elĵetu tiun aĉan serpenton en la rubujon, kaj ne tuŝu ĉi tiun manĝaĵon. Forprenu vin!”

Geoffrey sin fortiraĉis malrapide por enmeti la serpenton en la rubujon.

Dianna lasis la kuirejon kaj komencis sian hejmtaskon, samtempe spektante la televidon unuokule. La stufaĵo bol-etis milde sur la forno. Paco denove daŭris.

Fine la aŭto turnis sin en la vojeton. Panjo alvenis hejmon.

“Dianna, vi ja kuiris la stufaĵon bone. Odoras bonguste. Dankon pro via helpo.” Panjo tiam okupis sin per la plua preparado por la vespermanĝo.

“Lavu viajn manojn, ĉiuj. La manĝaĵo estas preta,” ŝi vokis al la infanoj. Baldaŭ ili estis ĝuantaj la bonegan stufaĵon kaj Dianna ricevis multe da laŭdo. Ĉiu komentis ke la viando estas tre mola, kaj bongustas. Panjo diris ke Dianna ne helpos pri la postlavo ĉar ŝi preparis la stufaĵon.

Dianna forlasis la kuirejon kaj Geoffrey sekvis ŝin.

“Mi estis prava, ĉu ne?” diris Geoffrey.

“Kion vi volas diri – prava pri kio?”

“Mi diris al vi ke la serpento estus bona en la stufaĵo. Do, mi pravas ĉu ne?”

“Vi ne...? Vi mensogas, ĉu ne? Geoffrey! Vi ne faris tion, ĉu? Geoffrey!!!”

Geoffrey ne donis iun ajn respon-don, sed kviete eniris sian ĉambron kaj fermis la pordon.

Verko premiita en
Konkurseto 2 2003 de *ESK*

Radio 3ZZZ

Radio 3ZZZ komencas arkivigi siajn programojn, tiel ke oni povos aŭskulti ilin per Interreto kiam ajn dum la semajno, kaj ne plu nur dum la efektiva enurba disaŭdigo de la programoj. Tio signifas ke vi povos aŭskulti la aktualan Esperantan dissendon je tempo

kiun vi mem elektos.

Ankaŭ estas esperate ke la sonkvalito de la programoj estos pli bona, pro la utiligo de novaj teknikoj.

Ĉar la nova disaŭdigo per Inter-Reto estos tutmonde aŭskultebla, ni deziras inkluzivi en la esperantaj programoj informojn pri Aŭstralio, tiajn kiaj interesos eksterlandanoj. Tio signifas ne propagadon pri Aŭstralio, sed diskutojn pri aktualaj problemoj kaj aktivecoj en Aŭstralio kiujn la ordinara esperantisto alilanda antaŭe ne sciis, ĉu pri la akvoproblemoj en Aŭstralio, ĉu pri la bilbioj kaj la peno ilin savi el malekzistiĝo, ĉu pri aliaj tutmonde interesaj temoj.

Kompreneble, la malgranda stabo de la esperanta programo en Melbourne ne povas kompili kaj paroli pri ĉio ĉi senhelpe. Do ni forte alvokas kaj petas kontribuojn de voĉtekstoj por inkluzivo en la programoj. Atentu ke se vi utiligos la voĉlegadon de kopirajt-protektita teksto, necesos kun la voĉtekstoj ankaŭ kunsendi skribitan permeson de la kopirajt-posedanto uzi la tekston.

Ankaŭ nuntempe necesas revizii la liston de membroj de la esperanto-fako de Radio 3ZZZ.

Por rajti plu disaŭdigadi la esperantajn programojn en Radio 3ZZZ, kaj ilin inkluzivigi en la nova enretiga sistemo, la Esperanto-fako devas havi almenaŭ minimumon da pagintaj membroj. Ĉiujare la nombro da membroj emas malpliigi, pro la morto, foriro, aŭ seninteresiĝo de iuj iamaj membroj; tial, ni petas kontakti la redakcion de la esperantaj programoj por membriĝi.

Adreso: Svetislav Kanaĉki, 72 Jubilee St, Mt Waverley Vic 3149.

Aŭskultu ĉe www.radio3zzz.com.au □

La eskapinta esperantisto

de Rosalie Schultz

Mi estas eskapinta esperantisto el Perto, kie mi lernadis Esperanton antaŭ pli ol dek jaroj. Post studi la medicinon en Perto mi eskapis. Unue mi iris al Kalgurlio, poste al Darvino kaj ĉirkaŭ la Norda Teritorio dum kvin jaroj. Ege interesas min labori kun la indiĝenoj. Poste, eĉ tia inter-kultura laboro iĝis ordinara. Nuntempe mi laboras en Kirakira en Insuloj Solomonaj.

Novajoj de Insuloj Solomonaj estas ĉiam malbonaj. Murdoj, korupteco de la registaro, kaj ŝmirmono kaj ĉantaĝado de taĉmentoj... laboristoj de la registaro (kiel mi) ne ricevas salajrojn dum kelkaj monatoj... Fremdaj firmaoj detruas belajn arbarojn kaj pagas preskaŭ nul impostojn. Tajvano volas vendi milionojn da tunoj da venena rubaĵo al la insulo Makirao kaj la registaro diras "jes"...

Sed ĉi tie mi estas tre paca kaj gaja. La homoj ĉi tie estas tre amikemaj kaj laboras ege forte. Ili kreskigas proprajn manĝaĵojn, naskas multajn infanojn kaj bonŝancaj homoj laboras por gajni salajrojn ankaŭ. Malmultaj privataj firmaoj troviĝas ekster la ĉefurbo Honiara, tial preskaŭ ĉiuj monoj venas de la registaro.

Jen mi la eskapinta esperantisto!

Kiel lingvon ni parolas solomonan piĝinon kiu estas simila al la Nov-Gvineo tok-pisono. La insulanoj parolas 67 diversajn lingvaĵojn, kun 30 dialektoj. La piĝino servas kiel la pont-lingvo kiel Esperanto devas iĝi la pont-lingvo por la mondo. Artefar-

itaj kaj eŭropo-devenaj estas ambaŭ, piĝino kaj Esperanto.

Fakte mi ne decidis veni al Insuloj Solomonaj. Mi proponis min al Volontuloj Aŭstraliaj Internaciaj, kaj ili proponis al mi kaj mia kunulo (ankaŭ kuracisto) postenojn ĉi-tie. Neniu aliaj kuracistoj estas ĉi tie. Antaŭ ol ni alvenis, la lasta kuracisto laboris ĉi tie en 1998.

Nia hospitaletto servas homojn tra la tuta provinco, kie loĝas 33 000 homoj. Bedaŭrinde la transporto estas tre malfacila kaj multekosta. La plejparto de malsanuloj kiuj venas al la hospitaletto venas de proksimaj vilaĝoj. Transporto estas per remboato kun motoro, ne tre sekura ĉar ni atingas la vastan maron. Alie oni povas piediri, trans montetoj kaj tra arbaroj. Vojoj ne troviĝas!

Troviĝas 34 klinikoj ĉirkaŭ la provinco, kie flegistoj kaj helpantoj kuras multajn malsanaĵojn, kiaj malario, pneŭmonio, ulceroj kaj vundoj. La medicino estas simpla kaj kutime efika, kaj la malsanuloj tre dankemaj. La morto ŝajnas proksima kaj homoj ne timas la morton, eĉ la morton de infanoj. Malsimile ol en Aŭstralio, kie morto estas malofta kaj timiga, kaj oni parolas pri malsanuloj kiuj progresas.

Mi rondvojaĝis ĉirkaŭ la insuloj de la provinco, vizitante ĉiujn klinikojn kun kelkaj flegistoj de la hospitaletto. La laboro de medicina vojaĝo estas forta. Ĉe ĉiu kliniko ni alvenas malsekaj kaj ondataj de la maro. Nesufiĉe da tempo por ripozi ĉar atendas dekoj da

malsanuloj. Sed la beleco de la vojaĝo kaj la dankemeco de la vilaĝanoj estas mirindaj.

Leteroj bonvenas al via eskapinta esperantisto (ankaŭ demandoj kaj eĉ vizitoj)!

[Verko premiita en Konkurso 2 2003 de *ESK*.
Adreso de Rosalie Schultz:
Rosalie Schultz
Kirakira Hospital
Makira Ulawa Province
Solomon Islands]

New Zealand Book Purchasers

In *ESK* number 63, July-August 2003, page 29, the announcement “Libroservo de AEA” failed to add for New Zealanders: “Order from AEA Libroservo, which will send the book (etc) with an invoice in Australian dollars. Do not pay to Australia (it would cost you \$15 for a draft); but pay (in NZ\$) to Jackie Fox, at PO Box 8140,

Symonds St, Auckland 1035. Remember to add 15% to the \$Aŭ figure to make \$NZ, unless Daniel Forrest has already converted to New Zealand dollars on your invoice. Then Jackie pays AEA in a lump sum, the same as she pays for our copies of *ESK* (which costs \$15 for the draft).”

Libro ricevita

Detlev Blanke: Interlingvistiko kaj esperantologio; vojoj al la fakta literaturo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2003. 40p. vinktita. Prezo ĉe UEA: €2,40 + 10% por sendokostoj.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Bone preparita listo de materialoj (revuoj, libroj, artikoloj, kc.) eldonitaj pri interlingvistikaj temoj. Kun utila bibliografio. Utila por fakulo.

Rigardinda legocentro

en Interreto estas la “Esperanta Kafejo” ĉe www.geocities.com/Paris/8159. Tie oni trovas kvin virtualajn tablojn. Kiam oni musklakas sur tablon, ekvidiĝas nova retpaĝo kun ampleksa aro da legeblaĵoj. Ekzemple, diversaj Analektoj de Konfuceo, novaj fabeloj, “La elfreĝo en la interreto” (satira poemo), novelo “Denaska kongresano”

(“en 1923, kongresanino fervora kaj profunde graveda tiel insistis partopreni en la kongresa programo ke ŝi devis neatendite, meze de la salono Kabe, subite naski filon, en la ĉeesto de kelkaj embarasitaj samideanoj. Mi estas la rezulto de tiu kongresa akuŝo. Mi do estas, se ne denaska esperantisto, almenaŭ denaska kongresano”.

For the Beginner

by Donald Broadribb

The following short message was found on an Internet discussion list devoted to the use of Esperanto on Macintosh computers:

Saluton,
Mi estas problemo.
Mi ne scias de vortaroj-programoj de Mak OS Ikso.
Fari vi scias de unu?
Dankon,

The message puzzled me at first. Then I thought of translating it word for word back into English, and found it read: "Hello, I am a problem. I not know of dictionary programs of Macintosh OS X. Do you know of one? Thanks,".

Presumably the writer was a non-English speaker who was trying to write in Esperanto by translating a text word for word into Esperanto, with disastrous results. The biggest puzzle, which seems to indicate that he had first translated from his native language into English, and then from English into Esperanto, is the second line, "*Mi estas problemo*" "I am a problem" instead of "*mi havas problemon*" "I have a problem". But perhaps the writer had not yet learned the English word "have", or possibly the Esperanto word "*havas*".

The rest of the message falls into place when we consider that the writer knows very little Esperanto grammar as yet. In English we say "I know of such a dictionary"; in Esperanto the equivalent is *Mi konas tian vortaron*. He has also translated the English "know of" by *scias de*, because he does not realize that the Esperanto word *scii* refers to intellectual knowledge learned by some sort of study. Esperanto uses the word *koni* for "know" when we mean "acquainted with some thing, or some person", and no translation for "of" is needed.

Thus far, then, the text should read:

Saluton,
Mi havas problemon.
Mi ne konas vortaro-programojn por Mac OS X.

(*Ikso* is the Esperanto name of the letter x, which is not in the Esperanto alphabet. But here it is part of a proper name: Mac OS X, which is the name of the operating system of all new Macintosh computers these days.)

"Do you know": The English word "do" has many meanings and functions. It would be interesting to research how it came to have so many. In any event, "do" only means "*faras*" when it comes to some activity, like making something. Another frequent use for "do" in English is to emphasise some statement: "I do have enough money!". For this Esperanto uses the word *ja*: *mi ja havas sufiĉan*

monon! But when “do” is used simply to indicate that a question is being asked, the Esperanto term to be used is *ĉu*.

“Do you know of one”: In English we use the word “one” for several very different meanings.

In counting, “one” is *unu*, to be sure. Another use for “one” in English is as an indefinite pronoun: “One uses a knife, fork, and spoon for eating, in the Western countries, but chopsticks in the Eastern countries”. For this, in Esperanto the word to be used is *oni*: *Oni uzas tranĉilon, forkon, kaj kuleron por manĝado, en la okcidentaj landoj, sed manĝbastonojn en la orientaj landoj.*

Yet another use for “one” in English is as a highbrow substitute for “I”; in satires, Queen Elizabeth would be represented as saying “One doesn’t like to say such things” which in Esperanto would be “*Mi ne ŝatas diri tiaĵojn*”.

But very often the English word “one” simply means “any”. The sentence here really means “Do you know of such a dictionary?” and in Esperanto the word for “such a” is *tia*, so the question “Do you know of one” would be: *ĉu vi konas tian?*

The entire text quoted at the start of this article would read, therefore, in good Esperanto:

Saluton,
Mi havas problemon.
Mi ne konas vortar-programojn por Macintosh OS X.
Ĉu vi konas tian?
Dankon

The Simple Uses of Si and Sia

In our last issue (*EPK* 64, July-Aug 2003) we looked at one of the puzzles presented by the uses of *sia*. In most instances, however, *si* and *sia* are straightforward and present no problem, providing we forget English usage and think in Esperanto terms. For example:

Lia decido pri sia estonteco = His decision about his (own) future

Lia decido pri lia estonteco = His decision about his (someone else’s, perhaps his son’s) future

La vojaĝo kun siaj obstakloj estos malfacila = The trip with its obstacles (those posed by the trip) will be difficult.

La vojaĝo en ĝia kaĝo estos malfacila por la birdo = The trip in its cage (the bird’s cage) will be difficult for the bird.

La tablo staras sur siaj kruroj. = The table is standing on its (own) legs.

Jen la tapiŝo kun tablo kiu staras sur ĝia mezo. = Here’s the carpet, with a table standing at its (the carpet’s) centre.

La ĉevalo estas en sia stalo. = The horse is in its (own) stall.

Mia najbaro diris ke la ĉevalo estas en lia ĝardeno. = My neighbour said the horse was in *his* garden. (*The neighbour's garden.*)

Si and sia do not distinguish sex or number. *Si* means him, her, them, depending on who is involved. *Sia* is his, her, their, again depending on who is involved.

For practical purposes, *si* and *sia* usually correspond to “herself/himself” and “her/his own”. Look at the following example closely to see this in action:

(1) *Mariino decidis ĉeesti la feston sen sia patrino.* = Maria decided to go to the party without her mother. [Her own mother]

(2) *Ŝia patrino diris ke Mariino decidis ĉeesti la feston sen ŝia permeso.* + Her mother said that Maria had decided to go to the party without her permission. [The mother's permission.]

Consider: if the sentence said *Mariino decidis ĉeesti la feston sen sia permeso* this would mean “Mary decided to go to the party without her own [Mary's] permission”. Not really a very likely event!

In (1) the “her” refers to Maria; in English we could make it clear by saying “her own” if it was not obvious from the context.

In (2) the “her” refers to the mother.

Si and *sia* are also used when some sort of generalisation is being made. For instance:

Estas ĉiam facile trovi sin en embaraso. = It is always easy to find oneself in difficulty. [Here the “oneself” means people in general, not some specific person.]

Ne ĉiam facilas obei sian propran konsilon. = It is not always easy to take one's own advice.

Damaĝi sian propran infanon, kiu menssanulo konscie farus tion? = Hurt their own child, what sane person would knowingly do that?

“Times”

We use the English word “times” in a variety of ways for which Esperanto uses very different expressions. This often poses problems for English students of Esperanto, and sometimes also for French and Spanish students of Esperanto.

Arithmetic: “Times” is a word we use very frequently, to indicate multiplication. For example: “seven times three is 21”. In Esperanto we use *-obl-* for this: *sepoble tri estas 21*.

This can catch the unwary when it is not a straightforward sentence. “If you take several times the recommended dosage, that medicine can be very dangerous” translates as *Se vi prenos pluroblon de la rekomendita dozo, tiu medika-*

mento povos esti tre danĝera. (*Pluroblo* = *plur* several + *obl* multiple + *o* which indicates a noun.)

Occasions: Many beginners make the mistake of using the word *fojojn* in sentences like the above, but *fojojn* means something very different. *Fojo* means “a single event”. *Plurajn fojojn* means “on several occasions”. So *Se vi prenos plurajn fojojn la rekomenditan dozon, tiu medikamento povos esti tre danĝera* means “If you take the recommended dose of that medicine on several occasions it can be dangerous”, rather similar to the warning “prolonged usage may be dangerous” which we see on some medicine labels.

Fojo is a useful expression to mean a particular occasion on which something happens. *Mi kutime trinkas kafon, sed ĉifoje mi akceptas trinki teon* means “I usually drink coffee, but on this occasion I will accept a cup of tea”. (*Ĉifoje* = *ĉi* this + *foj* occasion + *e* ending which indicates an adverb.)

Logically, since *fojo* means “an occasion”, *foje* would mean “on an occasion” implying a single occasion. In fairy tales, *Foje estis...* typically means “Once upon a time there was...” Thus we might hear *Foje mi spertis problemon pri...* meaning “Once I had a problem with...”


However in ordinary everyday writing and speaking many people use *foje* to mean “occasionally”, which implies a variety of occasions.

Consequently, it is not unusual to come upon such a statement as “*Foje mi sendis al li monpeton*” and it may be very unclear whether the speaker or writer means “Once I asked him for money” or “From time to time I asked him for money”.

It is very desirable, in such cases, to clarify exactly what you mean. The best way is by saying *Unufoje mi...* (Once, I), or *Kelkfoje mi...* (On several occasions I...). Since in speaking or writing it often does not occur to you that by saying *foje* you might be misunderstood, it would be best if you were to make a point of always saying *unufoje* or *unufojon*, or *kelkfoje*, rather than simply *foje*.

Many people like to use the expression *fojfoje*, meaning “from time to time”. Another frequent expression is *plurfoje* “on several occasions”.

Period: Another frequent meaning for “times” in English is to indicate a period in history. Many speakers tend to imitate English and say *En la tempo de Henriko VIII*, or *En tiu tempo de la historio* “In that time in history”. While not an error as such, it does show a rather impoverished vocabulary. The Esperanto word *epoko* has specifically this meaning, so *en la epoko de Henriko VIII* and *en tiu epoko* are a much better way of saying it. Notice that “time in history” is simply *epoko*, since *epoko* means “a historical period”.

Enough for now. — 

Nekrologo

Ni memoru geesperantistojn Else kaj Harry Peddie

Ĉiam afabla, li estis aktiva vigla esperantisto. Else mortis je la 3a de julio 2003. Harry kelkajn jarojn antaŭe. Else kaj Harry ĝuis feliĉan geedzecon dum multaj jaroj kaj naskis ses infanojn: kvar filinojn kaj du filojn.

Ili estis entuziasmaj esperantistoj, studentaj kun Marjorie Duncan ĉe la Vesperkolegio de Manly kaj ankaŭ ĉe la Lernejo por Pliaguloj en Dee Why, Harry dum longa tempo tre aktivis pri la renovigo de Esperanto-Domo en Sidnejo. Fakte, li estis la konstruisto. Li konsultis kun la arkitektoj, konstruistoj ktp. Ĉiutage li veturis de sia hejmo en Curl Curl al Redfern. Sekvante kaj subtenante lin ĉiam estis Else, kiu kuraĝigis lin, pretigis la

mangon por preni al la “laborejo” kaj sendube devis aŭskulti la multajn detalojn pri la planoj de la konstruota domo.

Dume li kaj Roger Springer (Manliano) regis la lokan radio-stacion, aranĝante esperantajn programojn, lecionojn, skeĉojn kaj parolad ojn.

Harry estis lerta pentristo, kies pentraĵoj pendas sur multaj muroj en multaj hejmoj.

Kaj Else kaj Harry antaŭen puŝis la valoron de Esperanto. Ili skribis al ali-landaj geamikoj kaj fine vizitis ilin, kiam ili vojaĝis al Eŭropo, kie ili devis paroli nur esperante. Io, kio laŭ Else estis la plej bona reklamo pri la Internacia Lingvo.

Adiaŭ, karaj amikoj.

Verkis Betty Cleminson

[El *Telopeo*]

En la e-librejo

la 10 plej nove elŝuteblaj verkoj estas:

Aleksandro Ŝarov: *Pizulo kaj Simplulo*, 120 p.

La deka logo [Omaĝe al Liven Dek], 214p.

B. Traven: *Mortula Ŝipo* [reviziita], 496 p.

Uzino 7, 110 p.

Uzino 6, 107 p.

Bjørnstjerne Bjørnson: *Synnøve Solbakken*, 152 p.

William Shakespeare: *La Venecia komercisto*, 144 p.

Ĉi tiujn kaj centojn da aliaj literaturaĵoj vi povas trovi ĉe <http://www.esperanto.nu/eLibrejo/>. Plej bone estas ke ĉiuj ĉi tiuj verkoj estas senpage haveblaj! Vi ne bezonas esti riĉulo por akiri kaj legi librojn en Esperanto. Kial ne mem provi,... kaj rekomendi al viaj amikoj kaj korespondantoj?

Netradukeblaj esprimoj

de Donald Rogers

La libro *They Have a Word for It* [ili havas vorton por ĝi] de Howard Rheingold, eldonita de Jeremy P Tarcher, en Los-Anĝeleso, estas humura leksiko de vortoj kaj frazoj el aliaj lingvoj (krom la angla). Rheingold klarigas la signifon de proksimume 150 esprimoj el diversaj lingvoj, inkluzive de kelkaj amerikaj kaj apenaŭ konataj lingvoj de Azio, de Afriko kaj de Pacifiko. Li diras ke ekzaktaj ekvivalentoj ne ekzistas en la angla, do tiu bezonas ilin. Surprize multaj estas facile tradukeblaj, aŭ ŝajne estas tradukeblaj, en Esperanton, sed ne ĉiuj, ĉar la kultura fono ne estas universala.


Jen kelkaj interesaj ekzemploj el la libro:

animateur (franca) *animanto*: homo kiu povas komuniki malfacilajn konceptojn al ĝenerala aŭskultantaro.

attacabottoni (itala): speco de tedulo, kiu atake kaptas en konversacio iun, kiu ne deziras. Bonvolu sugesti tradukon!

Demando: de kie venis la esperanta prefikso *bo*?

Respondo: Ŝajnas ke ĝi venis de la majaa lingvo (suda Meksiko kaj Honduraso). *bol* (majaa) signifas kaj *stulteco* kaj *boparencoj*, do eble *boulaĉoj* stultaj boparencoj.¹

1. Malfacilas kredi tion. Ja la franca lingvo uzas la terminon *beau* (prononcata: *bo*) precize sammaniere kaj kun la sama senco kiel la esperanta prefikso *bo*. Ekz: *beau-père* = *bopatro*. — 

contestaire (franca) *kontestemulo* — estas iu, kiu ĉiam malakceptas la nunan statuson.

cuor contento (itala) *korkontento* — la sento de feliĉa kontenta persono.

Drachenfutter (germana) ŝajnas esti *drakofuraĝo*. Tamen tiu estas nur la laŭlitera interpreto. Temas pri paciga donaco por edzino fare de edzo kiu revenas tre malfrue. Laŭ germana kutimo hejmenporti florojn aŭ dolĉaĵojn post ekzemple longa kartludado aŭ drinkado kun aliaj viroj.

Fachidiot (germana) *fakidioto*: ege mallarĝmensa teknika spertulo. Ĝi havas rektan tradukon en Esperanto.

far secco qualcuno (itala) laŭlitere *sekabuŝigi*: igi iun senparola per iu malica komento.

farpotschket (jida) *fuŝriparo*: io tute fuŝita, ofte post provo ripari ĝin.

frotteur (franca) *frotemulo*: viro kiu frotras sin kontraŭ nekonatul(in)oj en homamasoj.

haragei (japana) viscera (rilata al la nervosistemo) malrekta nevoĉa komunikado. *Telepatio* aŭ *gestosugesto*?

majie (ĉina) signifas malbeni la straton — *stratomalbeni*. En Ĉinio, pro familaj rilatoj kaj konfuceaj kutimoj, oni ne kuraĝas kritiki, koleri, aŭ insulti multajn homojn kiujn oni volas. Do oni eliras kaj malbenas la straton. Eble tiu estas solvo por tiel nomata (angle) *road rage*, por alidirekti la koleron celatan al veturantoj aŭ piedirantoj.

sabi (japana) *bela pateno* (angle: *pa-*

tina — tiu bela brilo kiu kresketas laŭ la aĝo de artobjekto. Notu la kulturan diferencon inter la japanoj, kiuj riverencas aĝon kaj la usonanoj, kiuj adoras junecon.

saper vivere (itala) *vivsaĝeco* — scii kiel vivi, sed italoj uzas ĝin por signifi scii kiel takte pritrakti homojn. Scii travivi sen treti sur la piedfingrojn de aliuloj.

sanza (Zande, Novgineo) *maskita insulto*. En socioj kie montri malamon estas tre danĝere, oni povas provi *sanza*-n. Inter la Azandoj, homoj kiuj havas malbonvolon al iu povas uzi *sanza*-n — ĉirkaŭparolo kiu utiligas vortojn kaj gestojn por krei kaŝitan, malican signifon per ŝajne ĝentila, sendanĝera parolo. La arto de *sanza* kuŝas en la lerteco necesa por doni kredeblan pretekston por ĉiu kaŝita signifo kaj sekreta gesto, se okazas ke la viktimo de la diraĵo ekrimarkas ĝin. Tiu formo de parolo estas ofta inter sklavoj kaj dungitoj.

uovo di Colombo (itala) *ovo de Colombo*: simpla memevidenta ideo, kiu ne venas en la kapon de tiu, kiu plej bezonas ĝin. Iam viro haltigis la aŭton pro rompita pneŭmatiko. Li elaŭtiĝis por anstataŭigi ĝin per la rezerva pneŭo. Li zorge deprenis la ŝraŭbingojn metante ilin en la naboĉapon de la rompita pneŭo. Sed la naboĉapo renversiĝis kaj la ŝraŭbingoj falis en drenon perditaj. Hazarde la parkita aŭto situis ekster azilo por mensmalsanuloj, kaj unu el la enloĝantoj, kiu estis spektanta tra la barilo, sugestis al la malfeliĉa veturanto, ke li prenu po unu ŝraŭbingo de ĉiu alia rado, surmetu la rezervan radon, kaj veturu al aŭtoriparejo. Admire la veturanto diris, “Kiel lerta! Mi neniam

pensus pri tio!” Al tio la enloĝanto respondis: “Nu, mi eble estas freneza, sed mi ne estas stulta!” Jen *ovo de Colombo*.

wabi (japana) — eta difekto, kiu kontribuas al eleganta tutaĵo. La plej simila esprimo en la angla eble estas *beauty spot*, sed ties senco temas pri malgranda natura aŭ arta makulo, ekzemple pigmenta nevuso sur vizaĝo de virino, konsiderata plibeligi ŝian aspekton. Eble *belmakuleto* estas proksima al la senco de *wabi*.

La libro de Reingold interesas al ni, kiujn interesas lingvoj, do mi rekomendas ĝin. Sed legantoj decidu ĉu iuj terminoj en ĝi estas utilaj praktike.

Propono

Vi scias ke lingvoj kopias kaj adaptas vortojn el aliaj lingvoj. Esperanto multe faras tion. La angla multe faras tion. Sed kiom da esperantaj esprimoj estas kopiitaj de la angla? Ĝis nun nur du vortoj, mi kredas: *Esperanto* kaj *Ido*. Mi proponas ke ni elektu kelkajn esperantajn esprimojn kaj uzu ilin en niaj anglaj parolado kaj skribado por ke ili estu adoptitaj de neesperantistoj parolantaj la anglan. Plej taŭgaj estas tiuj, por kiuj terminoj mankas al la angla. Estos bona propagandilo se kelkaj vortoj estas kopiitaj de la angla. La demando estas: kiujn esprimojn ni provu? Eble nia redaktoro starigos konkurson pri tio?

[Unue prezentita al Kongreso 2002 de NZEA en Wellington, aprilo 2002] □



POR RIDIGI
VIN



“Jam trian tagon mi ne volas labori. Kion tio povus signifi?”

“Verŝajne hodiaŭ estas merkredo.”[El *Eventoj*]



- Programo nomata *Esptapi* estas senpaga programo kiu estas utila por blindaj kaj ankaŭ vidantaj esperantistoj por voĉlegi esperantan tekston. Ĝi funkcias sur persona komputilo per Windows kaj elparolas helpe de la “Text-to-speech engine Italian” kaj “Microsoft Agent”, kiuj estas utiligebaj senpage. Legu pli ĉe:

<http://monto2000.hp.infoseek.co.jp/soft/esptapi.htm>.

[Fonto: *ret-info*]

- Diskutgrupo pri Esperanto-subtitoligo de diversaj filmoj aperis en la reto. Ĝia adreso estas:

subtitoloj@yahoogroups.com.

Esperantistoj kiuj interesiĝas pri la temo povas aliĝi sendante malplenan mesaĝon al:

subtitoloj-subscribe@yahoo-groups.com.

[Laŭ *ret-info*]

Accented Letters

Esperanto has six accented letters: ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ.

If you use Windows computers, Windows 95 and later versions of the Windows system include a number of Unicode fonts, which are capable of typing in Esperanto. Unfortunately, apart from Microsoft Word, very few other Windows computer programs make allowance for typing the Unicode characters (which include the Esperanto letters). The various e-mail programs as yet do not provide for Unicode.

There are five kludges to get around typing the normal Esperanto letters when writing e-mail, if you do not use the e-mail provision built into Microsoft Word Professional:¹

1. Use the letter x (which never occurs naturally in Esperanto) just after the letter that should have been accented e.g. cxian for ĉian. This is the most common method used in e-mails.

2. Put a circumflex just after the letter that should have been accented, e.g. c^ian.

3. Put a circumflex just before the letter that should have been accented, e.g. ^cian.

4. Use a trailing h as Zamenhof did: chian.

5. Use some accented letters, whatever happens to be available in your local character set. People, if not computers, will soon figure out what you mean.

To automatically convert any of these five methods into the normal Esperanto alphabet requires using a macro program, which most ordinary computer users are unfamiliar with.

There are also several free small programs which allow you to access the Unicode Esperanto characters even in the non-Microsoft-Word programs. These have been discussed in earlier issues of *ĜK*.

[Based on an article found at www.mindprod.com/esperanto.htm/]

1. Typing Esperanto in Microsoft Word for Windows poses no problem, as previously discussed in *ĜK*.

Esperanto en Tianjin-a Fremdlingva Universitato

de Han Zuwu

Kvazaŭ printempa zefiro, Esperanto ekblovis en Tianjin-a Fremdlingva Universitato. Kelkdekoj da gestudentoj lernantaj la anglan, hispanan, francan, germanan, japanan, korean aŭ aliajn lingvojn lernas nian lingvon diligente, gvidate de s-ro Han Zuwu ekde la 15-a de decembro lastajare. Ili havas lecionojn unufoje semajne, uzante la lernolibrojn de s-ro Li Weilun.

La kursanoj renkontiĝis kun japana esperantisto s-ro KABA Toyohiko el Kioto en la 28-a de februaro ĉi-jare. S-ro KABA kaj liaj japanaj studentinoj vizitis la kurson kaj faris prelegon kun titolo "Esperanto-movado en Uzi kaj mi." Post la prelego gestudentoj el Ĉinio kaj Japanio havis konversacion. Ĉina studentino Zhang Xiaoyuan volis havi materialojn pri la bela pejzaĝo de Arbaro ĉe Fuĵi-monto, ĉar ŝi estas studentino pri turismo kaj ne povis trovi la rilatajn materialojn. S-ro KABA afeble promesis ŝin helpi. Post unu semajno la studentino ricevis leteron kaj la bezonatajn materialojn senditajn de s-ro KABA. Ŝi diris kun granda ĝojo: "Kiel utila Esperanto estas! Mi persone perceptis la utilon de Esperanto kaj mi lernos ĝin pli diligente!" Vizito de alilanda esperantisto multe kuraĝigis la komencantajn lernantojn de Esperanto.

La utilecon de Esperanto sentis ne nur ĉinaj studentoj, sed ankaŭ japanaj

studentoj. S-ro KABA, instruisto en virina universitato en Kioto, dufoje gvidis siajn studentinojn veturi al Nankai-universitato en Tianjin por lerni la ĉinan lingvon. La studentinoj lernas diligente kaj petis sian instruiston s-ron Kaba helpi realigi ilian deziron — viziti familion de ĉino por pli detale koni la vivon de ĉinoj. S-ro Kaba transdiris la peton de la studentinoj al s-ro Han Zuwu, kaj s-ro Han afable konsentis akcepti ilin. La 23-an de februaro ili vizitis la hejmon de s-ro Han. Dank' al tio la studentinoj vidis la realan vivon de ordinara ĉino.

En retmesaĝo de s-ro KABA troviĝas la vortoj: "Kiam mi estis en Tianjin, vi aranĝis mian renkontiĝon kun Tianjin-aj esperantistoj. Pro tio mi devas esprimi mian elkoran dankon al vi. La vizito al via hejmo estis neofta ŝanco por miaj studentoj koni la vivon de ĉinoj. La prelegeto en via kurso ankaŭ estis grava sperto por mi, ĉar antaŭe mi neniam prelegis esperante en alilando. Vi havas multajn junajn lernantojn, tio envivigis la membrojn de mia Esperanta rondo en Uzi. Antaŭ du tagoj okazis monata kunsido de nia rondo, kaj mi koncize raportis pri mia restado en Tianjin..."

La faktoj montras, ke Esperanto fariĝas internacia komuna lingvo kaj ludas specialan rolon en la interkomunikado de diverslandaj popoloj en multaj kampoj. Pli kaj pli multaj novaj

La 51a Kansai Esperanta Kongreso

de Dianne Lukes

Okazis la 51a Kansai Esperanta Kongreso, kiun mi ĉeestis, je la 31a de majo kaj 1a de junio. Kansai estas la regiono en Japanio ĉirkaŭ Osaka. Partoprenis 270 Esperantistoj kaj ĉ. 50 ne-Esperantistoj. Mi revenis al Japanio por ĉeesti tiun saman kongreson en la pasinta jaro kiam ili jubileis kaj mia juna lernanto kaj amiko, Yuuki Takahashi, kiu havis nur 16 jarojn, prezidis la tutan aferon.

Ĉi-jare posttagmeze dum la lasta tago okazis Simpozio pri lingvoj kaj internacia komunikado, en la japana lingvo, kiu ricevis bonan atenton.

Dum la unua tago okazis Oratora Konkurso kaj mi gajnis la duan premion kiam mi parolis pri la fono de mia projekto, la Zamenhof-Projekto. Ankaŭ okazis fakkunsido por la Zamenhof-Projekto, jen mia raporto pri ĝi:

Fakkunsido: Zamenhof-Projekto

Zorganto estis s-ino Dianne Lukes.

Nombro da kunsidantoj estis naŭ.

Dum tiu ĉi kunsido la partoprenantoj ludis la rolojn de estraranoj de landaj asocioj de UEA el 9 landoj tra la mondo. Ili ricevis enkondukan leteron de la Zamenhof-Projekto de Japanio kaj ili devis pensi pri kiel respondi. Poste ili rolis diversajn esperantistojn

en la samaj landoj, kiuj ricevis leterojn de siaj Esperantaj Asocioj pri la Zamenhof-Projekto kaj denove ili devis diri kiel ili reagas. Finfine ili rolis personojn kiuj ne konas ion ajn pri Esperanto, sed havas konaton kiu estas esperantisto kaj kiu sendis al ili informon pri Esperanto kaj kiel lerni ĝin. Ili devis decidi kion ili faros pri ĝi, ĉu ili lernos ĝin, se jes kiam ili eklernos ĝin kaj kiel, se ne, kial ne.

Tiu kunsido tre helpis min kiel la kunordiganto de la ZP kaj mi tre dankis al la partoprenantoj pro iliaj streboj kaj sugestoj.

Mia prelego en la Oratora Konkurso

Post pli ol dek jaroj da volontula laboro kaj vigla penado por disvastigi Esperanton, kiel membro de Aŭstralia Esperanto-Asocio, mi pensis, ke Esperanto ne sukcesos kaj ke la mondo jam akceptis, ke la angla ja estu la internacia lingvo kaj, ke ĉiuj volas lerni ĝin.

Tial, kiam mi havis ŝancon iri al Japanio en aprilo 2001 por instrui la anglan, mi opiniis, ke mi tiel daŭre helpos mondan interkomprenadon, kaj, se la mondo volas lerni la anglan, mi povas helpi kaj poste ĉiuj povos kom-

preni egale unu la alian.

Post unu jaro da laboro en la grandega lingvolernejo Nova en Osaka, kie mi instruis la anglan al pli ol mil japanoj, mi atingis la profundan komprenon, ke la angla neniam estos egala, internacia lingvo por ĉiuj.

Mi ankaŭ trovis informon, pri kiu eĉ la Japanoj mem ne sciis, mi opinias. Estis, ke Japanoj, per la deviga lernado de la angla dum ses jaroj en altlernejoj, jam estas bone preparitaj por lerni Esperanton.

Mi pensis, ke mi povus informi japanajn junulojn, ke, se ili povus facile kaj rapide lerni la neŭtralan, internacian lingvon Esperanto ili gajnus multon por plibonigi la vivon.

Sed, kiel mi povus fari tion?

Tiam mi havis bonŝancon, vojaĝi per Pasporta Servo dum du monatoj tra Japanio, (post la Jubilea Kongreso, kiun mi menciis antaŭe ĝis kiam mi komencis mian novan postenon ĉe Shikoku en aŭgusto) kaj renkonti multe da esperantistoj kaj esperantistaj grupoj. Mi parolis kun ili pri miaj ideoj kaj ili kontribuis multon por helpi min formi bazon de la Zamenhof-Projekto.

Nun mi laboras en la granda japana entrepreno Sony, kaj mi sentas min en esperanta lulilo. Mia estro estas la bone konata esperantisto kaj malavara subtenanto de la lingvo, s-ro Etsuo Miyoshi. Ĉi tie mi havas sufiĉan liberan tempon tage por fari la projekton, kaj ili eĉ donis al mi komputilon kaj la eblecon interretumi per ĝi senpage.

Du gravaj punktoj, kiujn mi lernis de mia vojaĝo estas:

1. Interreto estas tre mirinda ilo por disvastigi ion ajn. Ĝi ankaŭ estas tre malmultekosta se oni jam posedas komputilon. Imagu kion Zamenhof povintus fari, se li havus tiun eblecon!

2. Ne nur Japanoj lernu Esperanton. Ili jam havas bonan kapablon komuniki inter si mem japane, kaj ne bezonas alian lingvon enlande. Do, ni devas enkonduki Esperanton tra la tuta mondo en la sama tempo; tiam ĉiuj povos uzi ĝin, kiel ili volos kaj kiel Zamenhof intencis. Imagu ankaŭ kion Zamenhof povintus fari, se li havus Esperanto-asociojn en pli ol 75 landoj, kiuj povus helpi lin kiam li ekdisvastigis Esperanton!

Tial, mi nomis mian projekton Zamenhof-Projekto. □



Por Ridigi Vin



Junulino revenas hejmen post vespero kun sia amiko. Ŝi ploras kaj plendas, kaj rakontas al sia patrino, ke Jeff antaŭ nur unu horo petis ŝian manon.

“Vi do kial tiom malĝojas?” demandis ŝia patrino.

“Ĉar li rakontis al mi, ke li estas ateisto. Panjo, li eĉ ne kredas je infero.”

Respondis ŝia patrino, “malgraŭ ĉio, edzigu lin. Inter ni, ni montros al li kiom li eraras.”

Kontribuita de Brendan Linnane [El *Tamen Plu*]

Sars maltrankviligas

kongresanojn de U.K. 2004

UK-2004 certe en Pekino
de Ivo Osibov, UEA-estrarano pri kongresoj

Post la komenco de SARS-krizo en Ĉinio ekestis duboj pri okazigo de la Universala Kongreso en 2004 en Ĉinio.

La Estraro de UEA faris neniun novan decidon. Ĝi nur konstatis ke post la proklamo de la Monda San-Organizo ke ĉesis la SARS-epidemie en Ĉinio, ne plu ekzistas duboj pri la okazigo de la kongreso en Pekino, kiuj ekestis pro

tiu epidemie. Tial la decido de la Estraro farita en januaro 2002 okazigi la 89-an UK 2004 en Pekino restas sensanga.

Mi esperas havi venontjare sukcesan laboran kaj ĝuplenan Universalan Kongreson kun partopreno de multaj esperantistoj el ĉiuj partoj de la mondo. □



POR RIDIGI
VIN



Iam, antaŭ longe, knabo nomita Johano promenis lernejen kun sia amikino, kies nomon ni ne konas. Li provis imponi ŝin dirante: “Ĉu vi kredas, ke mi povas puŝi la eksterdoman necesejon de mia patro en la riveron?” Diris la nenomita knabino: “Ne, tion mi ne kredas!”

Li do enriverigis la eksterdoman necesejon de sia patro. Imponite ŝi promenis la ceteron de la vojo al la lernejo manon en mano kun Johano. Tiun tagon en la lernejo, ili studis la historion pri Georgo Vaŝingtono kaj la ĉerizarbo. La moralo de la historio estis “neniam mensogu!”

Post la lernejo Johano iris hejmen. Enirinte la domon li renkontis sian patron. Diris la patro: “Filo, ĉu vi puŝis mi-

an eksterdoman necesejon en la riveron?” Respondis Johano: “Paĉjo, mi deziras esti kia Georgo Vaŝingtono, kiu neniam mensogis. Jes, Paĉjo, mi puŝis vian eksterdoman necesejon en la riveron.”

Punis lia patro Johanon tiom severe ke oni plurajn tagojn poste povis legi la gazeton sur lia postaĵo.

Longan tempon poste, kiam Johano ree kuraĝis – kaj povis – paroli, li demandis sian patron, “Paĉjo, vi kial bategis min ? Mi ne mensogis. Georgo Vaŝingtono faligis la ĉerizarbon, li ne mensogis pri tio, kaj neniu bategis lin.”

Respondis la patro de Johano: “Filo”, li diris, “mi estas certa ke la patro de Vaŝingtono ne sidis en la ĉerizarbo, kiam ĝi falis teren!”

[el *Tamen Plu*]

Marta kaj Gastono

de Gaye Phillips

Ŝi eniris la pordon de la malgranda ĉiovendejo en la vilaĝo, kaj la koncesiuulo, S-ino Pufo, diris: “Bonan matenon, Marta, jen la ĵurnaloj por Lia Moŝto.”

Marta prenis la paketon de kelkaj ĉiutagaj ĵurnaloj ligitaj per kaŭĉukabendo, samtempe rigardante la sortimenton de kremkukoj kaj tortoj en vitrino apud la vendotablo.

“Jes, ili aspektas bongustaj”, diris S-ino Pufo, “sed virinoj kiaj vi kaj mi ne devas cedi al tia tento”. Kaj la vangfaldoj sur ŝia vizaĝo ŝanceliĝis pro ridado.

Marta, en digna maniero, eliris la butikon. Kia impertinenteco! “Virinoj kiaj vi kaj mi?” Nu, estas certe, ke tiu dikulino bezonas dieti, sed ne ŝi. Haltante por regajni sian spiron, ŝi konfesis ke eble ŝia korpo estas iomete pli peza ol kutime. Sed — ŝi daŭrigis sian iradon kun la feliĉa penso: Gastono ankoraŭ nomas ŝin “Mia belulino”.

Kara Gastono — “Lia Moŝto” lin nomis ĉiuj escepte de la familio kaj amikoj; iama urbestro de Salino, la plej riĉa viro en la distrikto, kaj ŝia dunganto. Ne estis unu evento en ŝia vivo en kiu li ne ludis gravan rolon. Ŝia patrino Brigita, kiu laboris por Gastono sian tutan vivon, mortis dum la nasko de Marta; kaj estis Gastono kiu kuracis la malsaneman bebon, kaj ne permesis ke iu alia nutru ŝin.

Kiam lia edzino diris, “Kiu estas la patro?”, li nur ridetis sed ne respondis. Tenere karesante la etan vizaĝon, li diris: “Brigita estis orfino, do ĉi tiu be-

bo restos kun ni, kaj mi fariĝos ŝiaj patro kaj patrino.” Li preparis ĉambreton por Marta apud la kuirejo, kie la servistinoj prizorgis ŝin ĝis ĉenokte Gastono revenis hejmen de sia okupado. Ho, la ĝojo de tiu momento! La kisoj, la ridado, la petolaĵoj!

Kiam Marta pliaĝiĝis ŝi akompanis Gastonon al la oficejo de kie li administris la aferojn de sia bieno. Pro ŝia grandeco estis multo farenda, sed ŝi baldaŭ perfektigis, sub la pacienca gvido de Gastono, la taskojn kiujn li asignis al ŝi.

La korsento inter ili pli fortiĝis dum la paso de tempo. Ĝi iĝis tia amikeco, fidela, sindonema, kiu transcendas eĉ amon.

Ŝi memoris kiam ŝia juna fiilo, Karlo, malsaniĝis kaj mortis. Gastono tenis lin ĉe sia brusto, kaj liaj neregeblaj larmoj falis sur la senvivan korpon. Tra la tuta nokto li sidis kun Marta — ĉiam preta konsoli ŝin kiam ŝi vekigi el maltrankvila dormeto, plorante.

Tio okazis antaŭ tre longa tempo. Kelkajn jarojn poste Gastono falis de ĉevalo, frapante sian kapon kontraŭ roko; kaj la rezultinta spindamaĝo kripligis lin. La kuracisto diagnozis, ke li estos limigita al radseĝo por la cetero de sia vivo.

Kiam li revenis hejmen de la hospitalo post sia operacio, li estis en akuta stato de deprimado. Li decidis mortigi sin, kaj malŝlosis la ŝrankon en kiu pafilo estis kaŝita. Tuj Marta estis antaŭ li, ŝiaj okuloj plenaj de kompatado, amo, kaj mizero. Kun plorgemo li ĉir-

kaŭpremĉis ŝin, kriante, “Ho, kiel vi suferas pro mi! Kia aĉulo mi estas! Mia kara, mi ne forlasos vin.”

Li devis rezigni la postenon de urbestro, sed pro lia populareco ĉiuj ankoraŭ nomas lin “La Moŝto”. La bi-eno estis vendita, sed li retenis la farmdomon kun du akreoj da ĝardenoj kaj arboj. Al tiu paca loko li kaj Marta ofte iris dum la sekvaj monatoj, kaj iompostioe Gastono resaniĝis, kaj fine akceptis la ŝanĝojn en sia vivo. Li eĉ sukcesis, post granda penado, pied-

irimallongan distancon per la helpo de lambastonoj.

Marta rapidigis siajn paŝojn dum ŝi alproksimiĝis al la farmdomo. Jen li estas! Kara Gastono kiu, vidante ŝin, svingis sian manon, en kiu estis pakaĵo, kaj kriis, “Marta, mi havas ion por vi — donacon, por via naskiĝtago!” Metinte la ĵurnalojn sur tablon, li prenis el la pakaĵo grandan, viandkovritan oston kaj metis ĝin en ŝian buŝon.

[Verko premiita en
Konkurso 2003 2 de *EPK* □



POR RIDIGI VIN



Al ĉiuj dungitoj:

Malsano: Ni ne plu akceptos atestojn de via kuracisto. Se vi povas iri al la kuracisto vi povas iri ankaŭ al la laborejo.

Operacio: Ni ne plu permesos operaciojn. Tio longe kiom vi laboras ĉi tie, ni bezonos ĉiujn viajn organojn. Ni dungis vin kun ĉiuj organoj, kaj ni certe ne deziras ke subite io manku al vi — aŭ al ni.

Morto: Krom via propra plezuro, tio ne plu estos preteksto por ne labori. Vi povas nenion fari por la mortinto, kaj ni estas certaj, ke aliaj zorgos pri la necesaj aranĝoj. Sed, se la entombigo povus okazi dum la posttagmezo, ni volonte permesus ke vi laboru dum la manĝopaŭzo por ke vi foriru unu horon pli frue.

Via propra morto: Tion ni akceptos kiel pretekston. Tamen vi devos avizi nin almenaŭ du semajnojn antaŭe, ĉar necesos ke alia laboristo estu trejnata.

Krome: Tro da tempo estas misuzata en la necesejo. Estontece vi eniru ĝin laŭalfabete. Ekz. Tiuj, kies nomoj komenciĝas per “A” iros inter la 8-a kaj 8.15-a ktp. Se ne eblos al vi iri dum la

asignita tempo, necesos ke vi atendu ĝis la morgaŭo, kiam via tempo revenos.

Pridiskutas novan pastron Jozefino kaj Leo.

Demandas Jozefino: “Kion vi pensas pri lia vigleco dum predikado?”

Respondas Leo: “Ĝi estas bonega kaj instrua; antaŭ ol li venis, mi sciis preskaŭ nenion pri pekado!” [*Tamen Plu*]

Estas mi persono tre grava, ĉar mi havas pli ol mil homojn sub mi!”

“Jes, ni ĉiuj scias, ke vi estas ĉefĝardenisto en tombejo!” [*Tamen Plu*]

“Ĉu Edgardo ne plu sendadas al la redakcio siajn poemojn?”

“Ne. Li aĉetis propran paperkorbon kaj memstarigis sin.”

Onklino: Jes, mia etulo, la regulo estas, ke la sep-jara infano devas enlitiĝi je la sepa horo kaj la ok-jara je la oka horo.”

Knabeto: Ho, onklino, sekve vi tute ne devas enlitiĝi!” □

Vere, la ŝtonoj parolas

de Henriko Broadbent



Dum aprilo mia edzino Betinjo kaj mi vizitis la digojn de ŝtonetoj ĉe la nordokcidenta marbordo de la Golfo Spencer en Sud-

aŭstralio. Ties digoj el ŝtonetoj estis formitaj dum periodo proksimume antaŭ kvar-kvinmil jaroj. Tiam la nivelo de la maro tra la tuta mondo estis ĉirkaŭ tri metrojn pli alta ol nun.

Dum tiu mallonga periodo la ondoj superĵetis ŝtonojn el la bedo de la maro tie. La ŝtonoj estas angulaj kaj la maksimuma granda estas proksimume kiel de pugno. La tempo 1-2mil jaroj ne estis sufiĉa por ke la ondoj rondigu ilin. La marbedo tie estas ŝtona kaj ĵus antaŭ kelkaj jaroj oni trovis ke la grandegaj sepioj vizitas ĉiujare por kopuli kaj demeti ovojn kaj gardi idojn. Ĝi nun estas granda loko kiun emas plonĝantoj viziti — kaj bedaŭinde, ankaŭ kaptistoj.

En multaj lokoj ĉirkaŭ la mondo vi povas rigardi klifojn kiuj estis subtranĉitaj dum la sama periodo. Antaŭ tri jaroj mi rigardis ilin en Insulo Kanguroo.

Antaŭ nur 25 jaroj sciencistoj solvis la misteron de la “Glaciepokoj”. Ni nun scias ke dum la lastaj 2-4 milionoj da jaroj la mondo spertis Glaciepokojn, kaj post proksimume ĉiu centmiljara periodo okazas varma periodo nomata “Interglacia”. Ni nun estas en la mezo de Interglacio kiu komenciĝis antaŭ preskaŭ 12mil jaroj. Ja la mezo

okazis antaŭ preskaŭ 6mil jaroj. Kontraŭ la propagando ke la mondo komencas sperti pli varman periodon, multaj sciencistoj opinias ke baldaŭ la temperaturo malaltiĝos kaj post 10-20 mil jaroj ree ni spertos novan Glaciepokon.

La lasta varma interglacia periodo estis antaŭ ĉirkaŭ 115mil jaroj. Ankaŭ dum tiu periodo la maro devis altiĝi al la sama alto kiel antaŭ 4-5mil jaroj, ĉar mi rimarkis ke ĉe la malsupro de la digoj el ŝtonetoj estas tavolo de betoniĝintaj ŝtonetoj. Sendube, per la sama metodo, antaŭ 115mil jaroj formiĝis digoj. Evidente dum la lasta Glaciepoko kalka sablo kovris la digojn kaj la ŝtonoj betoniĝis.

Min multe surprizis vidi la betoniĝintajn ŝtonetojn ĉar mi opinias ke neniu antaŭe komprenis kion tio indikas. Kompreneble nur ekde la lastaj 25 jaroj la historio de la Glaciepokoj kompreniĝis. Do, kvankam vi povas trovi pri la digoj en la lernejoj libroj, neniu vere sciis ke la historio ripetiĝis.

Vi povas vidi la tavolon de betoniĝintaj ŝtonetoj en la bildo de la digo.

(Vidu sur la ĉisekva paĝo →.)



**POR RIDIGI
VIN**



En cirko:

“Kiel povas esti, ke tiel malforta kaj maldika viro estas tre bona dresisto de tigroj?”

“Ĉar kiam la tigro rigardas al li, ĝia apetito malaperas.

[El *Eventoj*]



Lau mia vidpunkto



de Marcel Leereveld



Tiuj mistike ludem-aj land- kaj popolnomoj! La zamenhof'a sistemo de landnomoj ne estas tre praktikema. Lia pria ideo estis lia-

tempe sufiĉe logika, bazita sur du specoj de landpopoloj, sed en tio li faris plurajn erarojn.

Unue, li ne estis konsekvecema: la nederlanda popolo ne havus malpli da naciaj karakterizaĵoj ol ekz. la franca, tamen en Esperanto ne ekzistas

nederlanda popolo, nur membroj de la ŝtato Nederlando, kontraŭe al la francoj, kiuj ne tute samas al la francujanoj.

Due pri la elekto de la vortoj: pluraj esperantaj popolnomoj sone similas al la landnomoj en la etnaj lingvoj; franco — France; portugalo — Portugal; norvego — Norway; Ĉinio — China, ktp.

Trie, en la nuntempo antaŭe novaj landoj jam tiom maljuniĝis, ke iliaj popoloj ofte aspektas tiel same homogenaj kiel la malnovaj popoloj, kaj oni

do por tiuj “novaj” popoloj bezonas specialan vorton, nun en Esperanto ne ekzistantan: nedero (kontraŭ nederlandano), iro (kontraŭ irlandano), libo (kontraŭ libiano), ktp.

Mi tamen daŭrigos uzi la pure zamenhof’an sistemon, sen neologis-

moj, kaj certe sen la aĉa “sufikso” -i-anstataŭ -uj-. Sed se iam la Akademio decidus plisimpligi la landosistemon, mi opinias ke la sola logika kaj praktika sistemo estos la jena:

<i>Lando</i>	<i>Popolo loĝanta ie ajn</i>	<i>Ŝtata membro de certa lando</i>
Franco	franculo	francano
Nederlando	nederlandulo	nederlandano
Ĉino	ĉinulo	ĉinano
Argentino	(argentinulo)	argentinano
Aŭstralio	(aŭstraliulo)	aŭstraliano
Usono	(usonulo)	usonano
Hispano (= Iberio)	hispanulo	hispanano
Espanjo	espanjulo	espanjano
Portugalo	portugalulo	portugalano
Afriko	afrikulo	afrikano
Islando	islandulo	islandano
Solomonio	(solomoniulo)	solomoniano
Mongolio	mongoliulo	mongoliano
Vjetnamo	vjetnamulo	vjetnamano
Svedo	svedulo	svedano
Danmarko	danmarkulo	danmarkano
Sirio	siriulo	siriano
Libano	libanulo	libanano
Italio	italiulo	italiano
Hindio	hindiulo	hindiano
Zairo	(zairulo)	zairano
Kenjo	(kenjulo)	kenjano
Pakistano	(pakistanulo)	pakistanano
Malajzio	(malajziulo)	malajziano
Brunajo	(brunajulo)	brunajano
Somalia	(Somaliulo)	somaliano
Suomio	suomiulo	suomiano
Germanio	germaniulo	germanano
Vatikano	(vaticanulo)	vatikanano
Bocvano	bocvanulo	bovcano
Irlando	irlandulo	irlandano
Ukrajno	ukrajnu Hlo	ukrajnano
Ĉeĥo	ĉeĥulo	ĉeĥano
Egipto	egiptulo	egiptano

Eŭropo	eŭropulo	eŭropano
Skotlando	skotlandulo	skotlandano
Njuzelando	(njuzelandulo)	njuzelandano
Jordanio	(jordaniulo)	jordaniano
Norvego	norvegulo	norvegano
Rusio	rusiulo	rusiano
Grandbritanjo	(grandbritanulo)	grandbritanano
Japano	japanulo	japanano
Svazilando	svazilandulo	svazilandano
Kampuĉeo	kampuĉeulo	kampuĉeano
Srilanko	(srilankulo)	srilankano
Kubao	(kubaulo)	kubaano
Koreo	koreulo	koreano
Meksikio	(meksikiulo)	meksikiano
Tunizio	(tuniziulo)	tuniziano
Groenlando	(groenlandulo)	groenlandano
Greco	greculo	grecano

Ankaŭ ekzistas radikoj por urboj, riveroj, ktp.: Alĝero-alĝerano, Meksiko-meksikano, Niĝero, Jordano; ktp.

Krome ekzistas radikoj por rasoj kaj antikvaj popoloj: greko, mongolo, albano, kaŭkazo, negro, indiano, germano, italo, anglo, aŭstralo, arabo, slavo, numano, franko, ktp.

La avantaĝoj de ĉi tiu sistemo estas la jenaj:

1^a Ĉiuj nomoj de landoj estas radikoj, nedivideblaj, kaj ne plu ekzistas du specoj de landnomado.

2^a La popolnomoj ne plu estas radikoj, do forestas la diskriminacio inter originaj popolnomoj (franco, germano) sen necesa rilato al la lando, kaj la popoloj kiuj konsideratas kiel miksaĵo (aŭstraliano, usonano, nederlandano).

3^a Malgraŭ punkto 2^a, tamen eblas, se dezirata, konsideri iun popolon kiel

artefaritan pro nacio, kaj ne uzi tian popolnomon. Ekz. ĉiam uzante “kanadano” kaj neniam “kanadulo”.

4^a La antaŭe originaj popolnomoj (franco, ktp.) ne plu portas du malsamajn signifojn: a) popolo kun homogenaj trajtoj, parto el kiu loĝadas ekster la lando (Francujo, ktp.), kaj kiel anoj de alia lando (= franculoj); kaj b) ŝtatanoj de la koncerna lando (Francujo, ktp.) (= francanoj).

5^a En multaj kazoj la nova landnomo tre similas al la (aŭ iu) etna nomo: la France = France; o Portugal = Portugal; España = Espanjo; Hispana = Hispano (= Portugal + Espanjo); Norvegen = Norvego; Schweden = Svedo; China = Ĉino; Japan = Japano; India = Hindio; Egypt = Egipto; la Grèce = Greco (Ancient Greece = Greko); Italia = Italio; la Suisse = Sviso; ktp.

Kelkaj komentoj de

La ĉisupra propono de Marcel ŝajnas al mi tre apoginda. Nuntempe la siste-

mo de landnomoj en Esperanto estas tute ĥaosa kaj jam de pli ol 100 jaroj!

Tiu haoso ne nur signifas ke neniu uzanto de Esperanto plene certas esti uzanta “aprobitan” nomon, sed ekzistas akraj disputoj pri aro da landnomoj (inter ili: Koreo/Koreio, Vjetnamo/Vjetnamio, Japano/Japanio/Japanujo, Hindio/B(h)arato, Finnlando/Suomio). Intertempe la nomaro sekvas nenian logikon. Kaj, kiel rimarkigas Marcel, pluraj el la nuntempe uzataj popolnomoj samas aŭ similas al la internacie uzataj landnomoj (kaj eble inverse).

Mi iomete neakordas pri nur tri detaloj: Mi mem preferus uzi la nomon Hispano por la lando, kaj Iberio por la kombinaĵo Hispano+Portugalo; Iberio

jam estas tiel uzata en Esperanto. Kaj la nomon Njuzelando mi ne ŝatas, ĉar ĝi estas bazita sur la prononco de la anglalingva nomo, dum la aliaj nomoj uzataj kaj proponataj estas bazitaj sur la skriboformo de la koncerna internacie konata nomo. Mi preferus simple skribi Novzelando (sen streketo).

Kaj laste, por konservi la internacian uzadon, mi preferas la formon Meksiko por la lando, kaj Meksikurbo por la ĉefurbo, simile kiel la meksikanoj mem skribas kaj parolas en sia lingvo, kaj paralele al Brazilo por la landnomo (Brazilurbo por la ĉefurbo de tiu lando). □



POR RIDIGI VIN



Juna blondulino feris en Aŭstralio. Ŝi forte deziris paron da veraj krokodilŝuoj, sed la aŭstraliaj ŝuvendistoj postulis tro da mono.

Fine ŝi perdis la paciencon kaj diris al iu ŝuvendisto: “Eble estus pli bone, se mi mem kaptus krokodilon, tiam mi povus havi krokodilŝuojn je modera prezo!”

Diris la ŝuvendisto, “Jes, kial ne, eble vi kaptos grandegan krokodilegon!”

Eliris la blondulino. Iom pli poste preterveturis la ŝuvendisto. Li vidis ŝin staranta en akvo ĝis la talio. En ŝia mano estis granda pafilo. Naĝis proksime al ŝi naŭ metrojn longa krokodilo. Ŝi ekcelis ĝin, pafis kaj mortigis la kompatindulon. Malfacile ŝi tiris la kadavron sur la teron.

Proksime kuŝis pluraj aliaj krokodilkadavroj. Mirante rigardis la ŝuvendisto.

Tiam la blondulino turnis la krokodilon dorsflanken, kaj elkriis malĝoje:

“Ankaŭ ĝi ne surhavas ŝuojn !”

[el *Tamen Plu*]

Sekretariino alvenas, la trian fojon, tre malfrue al la oficejo. Vokas ŝin en sian oficejon la oficestro dirante:

“Nu Eileen, mi scias ke vi kaj mi antaŭ nelonge, ktp., sed tio jam finiĝis. Mi volas ke vi konduku same kiel ĉiuj aliaj dungitoj ĉi tie. Kiu diras ke vi povas veni kaj foriri laŭ via plaĉo?”

Riditis Eileen, kaj ekbruliginte cigaredon, ŝi respondis:

“Mia advokato.” [el *Tamen Plu*]

En la lernoĉambro, la instruistino aŭdas “ĉu ĉu ĉu” funde de la klaso. Por silentigi ilin, ŝi postulas:

“Joĉjo, diru al mi du pronomojn!”

“Kiu? Mi?” li diras leviĝante.

“Tre bone! Vi povas sidiĝi .

“Mia kara, aminda...” komencis ŝi.

“Ĉu robon aŭ ĉapelon?” demandis li.

[El *Eventoj*]

Odlo Bokserp: Liaj paĝoj

Mi pardonpetas ke miaj paĝoj ne aperis en la du plejlastaj numeroj de *EPK*, tiel ke nia kara Reaktoro devis sola prizorgi la preparadon de la tekstoj de nia mondkonata plejglora revuo. Sed mi esperas ke miaj fidelaj legantoj komprenos, kiam mi klarigos ke mi devis pasigi tiun tutan periodon per argumentado en tribunalproceso.



Ŝajnas ke iu pingvenparaĉo aŭdacis procesi kontraŭ mi, pro mia rifuzo akcepti ilin kiel membrojn de la Internacia Asocio de Presmisistoj ĉar ili

nenion presas. Ili diris ke ili lasis impreson sur la ĉikuna foto, kaj tial rajtas esti membroj. Mi perdis en tiu proceso, ĉar la juĝisto deklaris ke mia rifuzo kontraŭas la Internacian Konvencion pri la Rajtoj de Birdoj, kiu estis subskribita de la Ĉefministro de Aŭstralio en iu jaro (la juĝisto ne memoris precize en kiu jaro, kaj rifuzis enketi pri la dato, ĉar li volis mallongigi la proceson por povi golf-ludi dum tiu posttagmezo).

Nu, tio kompreneble memorigis min pri antaŭaj procesoj okazigitaj de pingvenoj, kaj plej klare pri certa proceso kiu okazis en la deknaŭa jarcento kiam mia praparenco Odlo Bokserp minus-VIIa estis Pres-Kontrolisto Ĝenerala de Nova Suda Kimrio. En la renoma historia verko *The Hawkesbury Doyles*¹ estas registrita la histo-

rio de mia glora eminenta prafuŝista parenco Andrew Doyle. Ni legas ke

6a de junio [1801]: Majoro Swann [evidente oni tiutempe ankoraŭ ne sciis distingi inter cigno kaj pingveno², kaj tial misnomis lin] arestis ĉisemajne pro sia kutima zorgatento konatan krimulon nomitan Doyle, kun kiu troviĝis granda kvanto da falsitaj bankbiletoj, ŝablonojn por ilin presi, kaj kompletan aparataron, nome presilojn, kc. kc. La Majoro konfiskis ilin ĉiujn kaj tuj enkarcerigis la krumulon, kiu post nelonge estis laŭleĝe punita pro sia partopreno en la disvastigado de falsitaj bankbiletoj.

...[li] trovis ĉian aparaton necesan por fabriki bankbiletopaperon kaj pretigi la kuprajn ŝablonojn.

Kiel punon oni transsendis lin al Aŭstralio, kutiman punon tiuepoke. En Nova Suda Kimrio li amikiĝis kun la Koloniestro, kiu liberigis kaj dungis lin por desegni indiĝenajn plantojn.

Do jen la unua konata fiproceso iniciatita de Pingveno (kvankam misnomita "Cigno") kontraŭ honesta kaj talenta falsisto, unu el la praekspertoj en la presadindustrio.

Nu, miaj amataj gelegantoj (kaj malamataj nelegantoj), lernu per tio ke... Nu, verŝajne ion, mi supozas!

2. Cigno kaj Pingveno: la diferenco estas tute klara:



1. De A.P. Doyle. Illawarra Historical Publications, 1992,

La Aŭstralia kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj

Aŭstralia Esperanto-Asocio:

<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: *Matthew Maquire*, 4 Nioka Rd, Narrabeen NSW 2101. maquirem@optushome.com.au.

Vicprezidantoj:

Jennifer Bishop, 39 Hill St, Hawthorn Vic 3122. ☎ 03 9818 7358 (AH), 03 9905 2806 (BH). esperanto@education.monash.edu.au.

Terry Manley, 55 Alagalah St, Narromine NSW 2821. teren@mail.ans.com.au.

Sekretario: *John Gallagher*, 81 Lalla Road, Lillydale Tas 7268. abcetc@ozemail.com.

Helpsekretario: *Hazel Green*, 44 Toowoomba Road, Oakey Qld 4401, Aŭstralio. hazgreen@twmba.net.

Kasisto: *Stephen Pitney*, 57 Denham St, Hawthorn Vic 3122. Pitney@goldenit.net.au.

Helpkasisto: *Ken Rolls*, 31 Miller Crescent, Mount Waverley Vic 3149. kenjohnrolls@yahoo.com.au.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

www.esperanto.org.nz

PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035

Prezidanto: *Bradley McDonald*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09 579 4767.

bradley@esperanto-lingvo.org.

Vicprezidanto: *David Dewar*, 4 Harlech Mews, Avonhead, Christchurch 8002. gd-dewar@ihug.co.nz.

Sekretario: Howard Gravatt, PO Box 8140, Symonds Street, Auckland 1035. ☎ 09 626 6129. hgravatt@ihug.co.nz.

Helpsekretario: *Kris Krageloh*, 20 Alec Craig Way, Gulf Harbour, Whangaparaoa 1463.

Kasisto: *Jackie Fox*, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ 09-826 2081.

Jackiefox@paradise.co.nz.

Kotizoj:

\$Aŭ30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Kotizoj:

\$NZ40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto.

Esperanto sub la Suda Kruco

Redaktoro: Donald Broadribb

PO Box 643, York WA 6392, Aŭstralio. ☎ (08) 9641 1937. 📠 (08) 9641 1134. E-poŝte: sudakruco@sudakruco.org. Retsito: <http://sudakruco.org>. Membroj de AEA kaj NZEA aŭtomate ricevas *ĈK*-on. Prezo de pliaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: por membroj de AEA kaj NZEA, po AU\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA. Abonoj ekster Aŭstralazio kostas €23,70; pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 2003 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 2003 de la Aŭstralia kaj Novzelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de *ĈK* estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per iMac. La programo uzita estas FrameMaker. La tiparo uzita estas New Century Schoolbook. La reteldono estas preparata uzante Acrobat-on.

Specialaj kunlaborantoj:

Odlo Bokserp, I.N.K, K.R.A.J.O.N, K.R.E.T
Prezidanto de la Internacia Asocio de Presmisistoj
Vera Doloro, L.M.K.
[Lia multsuferanta kontrolanto]

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, P.O. Box 643, York WA 6392, Australia
Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic 3168, Australia

If undeliverable return reply paid to
D. Broadribb
PO Box 643
York WA 6302
Australia

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO
Vol. 11, No. 5, Septembro-Oktobro 2003

Print Post Approved
PP631048/00005

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

**SURFACE
MAIL**